

Ludoj por la perbilda instruado
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 491, 1981.06.25 & 27

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La pasintan semajnon ni prezentis al vi la enhavon de la kvin unuaj slipoj el sliparo por la perbilda instruado. Ĉiu slipo plimalpli korespondas al tio, kion oni povas instrui dum lecioneto dudekminuta. La posta lecioneto ĉiam estu dediĉita al la ripetado de la antaŭaj ekzercoj, sub formo de ludoj kaj de konkursoj. Kiel ni promesis, ni ĉisemajne daŭrige prezentas tiun ĉi sliparon.

A.- La sesa slipo rilatas al distingo, kiujn oni povas enkonduki, kiam du aŭ eĉ tri samnomaj lernantoj troviĝas en klaso. Se tio ne estas, oni simple forlasu la proponitan ekzercon. Jen la enhavo de tiu ĉi slipo:

Cl.- Se hazarde en grupo troviĝas du lernantoj kun sama nomo, venigi ilin kaj diri, bone montrante, ke temas pri la alteco: "Granda Karlo - Eta Karlo."

A.- Rimarko: la diroj Karlego - Karleto ne taugas, ĉar ili ĝenerale rilatas al la dikeco.

Cl.- Se hazarde en grupo troviĝas tri lernantoj kun sama nomo, venigi ilin kaj diri ekzemple Granda Karlo, Mezgranda Karlo, Eta Karlo"

A.- Anstataŭ "Eta Karlo" oni ankaŭ povas diri "Malgranda Karlo."

Cl.- La slipo sepa proponas ekzercon kun la nomoj de la gelernantoj, kiujn oni skribis sur porflaneltabulaj paperfolioj, laŭ indikoj, kiujn donas la slipo kvina, kiun ni prezentis la pasintan semajnon.

A.- la sepa slipo diras:

Cl.- Kiam ĉiuj paperfolioj troviĝas sur la tabulo kun la nomoj de la gelernantoj, la instruisto diras ekzemple "Kiu estas Karlo?" montrante la koncernan nomon

A.- Respondoj eblaj: Mi, Li, Ŝi.

Koruso: Respondoj eblaj: li aŭ ŝi.

Cl.- Eviti la lernejecajn formulojn: Mi estas Karlo, li estas Karlo, ŝi estas Eva.

A.- La slipo oka proponas alian ekzercon kun la nomoj de la gelernantoj.

Cl.- la instruanto prenas sian nomon dirante; ekzemple: "Mi nomigas Klaŭdo."

A.- Koruso: Vi nomiĝas Klaŭdo.

Cl.- La instruanto sin turnas al lernanto kaj diras: "Prenu vian nomon. Kiel vi nomiĝas?"

A.- Lernantino respondas ekzemple "Berta".

Cl.- Instruanto: ŝi nomiĝas Berta.

A.- Koruso: Ŝi nomiĝas Berta.

Cl.- Tiel ĝis kiam ĉiuj havis la okazon preni sian nomon.

A.- Konkludo de la lud-ekzerco: Metu vian nomon en la skatolon.

Cl.- Ni ripetas, ke ĉiujn ordonojn oni donas nur en esperanto. En la perbilda instruado, kiel en la pergesta, oni neniam krokodilas, kaj oni neniam tradukas.

A.- La naŭa slipo proponas konkurson. Jen ĝi:

Cl.- Meti la bildojn sur la tablon aŭ sur la plankon, laŭ la instru-situacioj. La instruanto metas sian nomon sur la tabulon kaj prenas bildon dirante ekzemple: Mi prenas bildon de fontano.

A.- Koruso: Ĝuste, vi prenis bildon de fontano.

Cl.- La instruisto metas la bildon post sian nomon kaj metas nomon de lernanto dirante ekzemple: Karlo, prenu bildon.

A.- Karlo: Mi prenas bildon de pomarbo.

Cl.- Koruso: Ĝuste, li prenis bildon de pomarbo.

A.- Tiam Karlo metas la bildon post sian nomon.

Cl.- Se Karlo eraris en la nomado de la bildo la koruso diras: Malĝuste li prenis bildon de prunarbo.

A.- Tiam Karlo remetas la bildon sur la tabulon aŭ sur la plankon. Ĝin povas tuj preni la posta lernanto.

C1.- La konkurso finiĝas, kiam ĉiuj nomoj kaj ĉiuj bildoj estas sur la tabulo. Nombri la bildojn de ĉiu lernanto por trovi la venkanton.

A.- La deka slipo proponas ekzercon, kiu asimiligas novajn nomojn. Jen ĝi:

Cl.- Meti sur la tabulon 10 konatajn bildojn kaj 10 novajn bildojn. Nomi ilin per la formulo: Tio estas -o, tio estas -o, ktp. Vidu la slipon unuan. Poste la instruanto diras: Atentu! Mi forprenas bildon. Kion mi forprenis?

A.- Koruso, ekzemple: la domon.

C1.- Daŭrigi, ĝis kiam ĉiuj bildoj estas forprenitaj. Poste la instruanto diras: Atentu! Mi remetas bildon. Kion mi remetis?

A.- Koruso: ekzemple: La sorĉiston, kiu kraĉas fajron.

Cl.- Daŭrigi, ĝia kiam ĉiuj bildoj estas remetitaj. Tiu ĉi ludo estas tre bona enkonduko al la ekzerco de la akuzativa distingo. Sed nur ripetaj ekzercoj akirigu la formulon: Kion mi forprenis? - la -on. Aŭ "Kion mi remetis? - La -on.

A.- La slipo de kunua proponas ludon.

Cl.- Meti dudek bildojn sur la tabulon nomante ilin per la formulo : Tio estas -o, tio estas -o, ktp. La lernantoj korse ripetas. Poste la instruanto diras: Atentu! ni ludu ! Stariĝu! Faru duonan turniĝon !

A.- Li forprenas bildon.

Cl.- La instruanto: Rigardu la tabulon! Kion mi forprenis?

A.- Lernanto diras ekzemple: Ĉevalon?

Cl.- Instruanto: Guste. Jen la ĉevalo!

A.- Li donas ĝin al la lernanto.

Cl.- Aŭ okaze de malĝusta respondo. Instruanto: Malĝuste. Kaj li refaras sian demandon: Kion mi forprenis?

A.- Daŭrigi ĝis kiam ĉiuj bildoj estas forprenitaj. Kalkuli, kiu venkis.

Cl.- Noto: Antaŭ ol diri Atentu! oni povas renomi la restantajn bildojn: Tio estas ĉapelo, ktp...

A.- Post tiu ĉi lud-ekzerco, la slipo de dua proponas konkurson: Oni unue agu, kiel sur la ĵus menciita slipo de kunua, sed metante sur la tabulon ĉiujn konatajn bildojn. Kiam pluraj lernantoj samtempe respondas, meti la koncernan bildon en la skatolon. Temas pri nomoj bone konataj. Venkas tiu, kiu plej multe ĝuste respondis.

Cl.- Tio donas la eblon malkovri la plej lertajn lernantojn.

A.- Tiu ŝatata konkurso estas bona maniero ripeti la vortprovizon. Oni povas decidi, ke tiu kiu erare respondas, devas redoni bildon, kiun li havas. Meti ĝin en la skatolon.

Cl.- Dum la pentekosta semajnfino okazis en La Chaux-de-Fonds pedagogia seminario pri la perbilda instruado, kaj la partoprenantoj miris, kiom da lingvaj ekzercoj, ludoj kaj konkursoj oni povas fari per nur kelkdekoj da bildoj fikseblaj sur flanel-tabulon. La venontan semajnon ni daŭrigos nian prezentadon de tiuj ekzercoj. Hodiaŭ vi aŭdis tiujn, kiujn proponis la slipoj 6 ĝis 12.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond raportis pri la perbilda instruado. Ĝis reaŭdo!